# KONTAKTO

Informbulteno n° 1

I4-3-I96I

Al la Gemembroj de Flandra Ligo Esperantista,

Dum la pasinta jaro vi certe miris pro la ne plu akurata kaj regula apero de nia monata bulteno "Flandra Esperantisto". Precipe la malnovaj abonantoj kiuj jam de multaj jaroj restas fidelaj al nia revuo, tre bedaŭras tion kaj ili esperas je baldaŭa reveno al la antaŭa situacio.

La precipaj kaŭzoj estis unuflanke ke kunhelpo al organizado de la Universala Kongreso en Bruselo postulis ĉiujn liberajn horojn de pluraj estraranoj kaj aliflanke la fakto ke la abonkotizo ne plu sufiĉas por kovri la eldonkostojn de I0 numeroj en la jaro.

La universala kongreso nun estas for, sed la dua malhelpo restas; la kostoj de la presejo konstante plialtiĝas, dum ke la abonkotizoj restas sur la sama nivelo.

Nia kasistino, F-ino J. Terryn, Raapstraat 72, Gent, forestos dum la monato aprilo kaj sekve post kelkaj tagoj la kvitancoj por la abonkotizo I96I estos ekspedataj . Tio estas: I00 fr. por ordinara membro, I50 fr. por membro-subtenanto; gejunulo ĝis la 2I-a jaro: 50 fr.; enloĝanta membro: 35 fr. Ĉu ni povas esperi je akurata pago? Dankon !

La venonta numero de FLANDRA ESPERANTISTO aperos post kelkaj tagoj. Por iom ŝtopi la truon inter la apero de 2 numeroj, la estraro projektas dissendi pli ofte cirkulerojn laŭ modelo kaj amplekso de la nuna. Tielmaniere ĝi esperas havi pli regulan kontakton kun ĉiuj membroj de Flandra Ligo. Per tia "KONTAKTO"-folio vi estos pli regule kaj pli rapide informata pri la ĉefaj okazintaĵoj en Esperantujo.

Multaj el vi verŝajne ankaŭ miras ke ĝis nun nenio estis komunikata koncerne la Beneluksan kongreson kiu kutime okazas dum la Pentekostaj tagoj. Pri tio devas interkonsili kaj decidi la Nederlanda Asocio, Belga Ligo kaj Flandra Ligo; taŭga komuna aranĝo ne jam estas trafita. Laŭ antaŭa interkonsento, la valonaj samideanoj devus laŭvice prizorgi la aranĝon sed en tiu regiono la E-movado ne estas tre forta kaj ili ne estas tre entusiasmaj por akcepti la taskon. Antaŭvidite estas 2-taga kunestado en Antverpeno, kun ne-multe da oficialaj aranĝoj sed tiam kun despli da personaj kontaktoj kaj debatoj precipe pri la grava problemo: kielmaniere plej efike plifortigi la E-movadon en Belglando.

Ĉi-tiu jaro, la 46-a universala kongreso okazos en Harrogate, Anglujo. Ĝis fino de januaro sin anoncis 27 partoprenantoj el nia lando.
En I965 la 50-a kongreso okazos en Tokio; partoprenontoj jam komencas ŝpari kio cetere fortenos ilin de la intertempaj kongresoj.
Por la kongreso I963, la bulgara asocio antaŭmetis la kandidatecon de Sofia.

La eldono de "Flandra Esperantisto" prezentas ne nur gravan financan problemon, sed ankaŭ koncerne kunlaboron ni same ne estas tre kontentaj. Se la revuo respegulas precipe la opinion aŭ starpunkton de la ĉefredaktoro estas ĉar neniu ensendas nek tekstojn nek deziresprimojn pri la preferitaj tekstoj. Se vi juĝas libro-recenzojn tro ampleksaj, estonte ili povas aperi pli koncizaj .Se vi preferas pli da literaturo aŭ havas intereson por alia rubriko, skribu al la redaktoro. Tro malofte aperas informoj pri la aktiveco de la grupoj sed same ne la redaktoro kulpas pri tio, sed la grupestroj kiuj nenion ensendas. La gazeto respegulas la aktivecon de la kunlaborantoj. Kun melankolio la ĉefredaktoro pensas al la tempo kiam pro tro da abundeco interesaj artikoloj ne povis aperi.....
Kontaktu kun la ĉefredaktoro Fernand Roose, St.Klaradreef 59, Brugge, kiu estos tre feliĉa se la nuna alvoko trovas eĥon!

Pri la teksto de la nuna kontaktfolio respondecas la prezidanto de Fl.Ligo; rimarkojn pri ĝi oni do direktu senpere al li.

# KONTAKTO

Informbulteno n°
27-4-1961
aperas laù neceso .

Al la gemembroj de Flandra Ligo Esperantista,

Kiel vi sendube scias, antaù pluraj jaroj estis interkonsentite ke niaj kongresoj okazu en la kadro de Beneluksa arango, alterne en Nederlando, Flandrujo kaj Valonujo.

Sekve al tiu arango, laùvice apartenas nunjare al Valonujo prepari la komunan kunvenon de la Nederlanda Esperanto-asocio LEEN, de la R.Belga Ligo Esperantista kaj de la Flandra Ligo Esperantista.

Ĉar Valonujo nombras nur malmulte da esperantistoj, estis sufiĉe malfacile trovi personojn pretajn preni sur sin tiun taskon. Tial, nur apenaù kelkaj semajnoj antaù ~~Pentek~~ Pentekosto, estis finfine trovita solvo. Namuro gastigos nin kaj samideanoj el Lieĝo helpos por la organiza laboro. Ankaù el Charleroi sin prezentis diversaj helpemuloj.

Malgraù ke la invito atingas vin malfrue, ni esperas ke tamen almenaù venos la kerno da fideluloj kiuj jam de multaj jaroj neniam mankas al tiaj rendevuoj.

Jen la provizora programo :

SABATON, la 20an de majo :
je la 15a h.: Malfermo de la akceptejo en "Taverne Pax", Pl. St.Auba (apud la katedralo)
je la 17a h.: Delegacia flordemeto ĉe la monumento al la Militmortintoj
je la 19a h.: Laùvola vespermanĝo
je la 20a h.: Vespera promenado tra la lumigita urbo aù/kaj prezento de filmoj.
DIMANĈON, la 21an :
je la 9a h.: Diservo.
je la 10a : Kunsidoj de la tri ligoj
je la 11,30a: Oficiala akcepto en la urbdomo
Je la 13a : Libervola tagmanĝo
Je la 15a : Promenado tra Namuro
Je la 19a : Festeno en Hotelo Victoria) Fr.120.- servmono enkalkulita; sed sen trinkaĵoj)
kaj amuza vespero: kantado, muziko, dancado.
LUNDON, la 22an : Ekskurso verŝajne al Profondeville, kun eventuala akcepto oficiala.

Dum la Pentekostaj tagoj estas tre multaj turistoj en Namuro kaj la loĝadebleco estas tre limigita. Aldone vi trovos aliĝilon kaj la Kongreskomitato insistas por ĝin resendi rapide kaj plej laste en la unuaj tagoj de majo.

La membroj de la sekcio Brugge ricevos la aliĝilon senpere de tiu sekcio.

---

La lasta numero de "Flandra Esperantisto" ne aperis je la promesita dato. Pri tio ni ne kulpas, ĉar la teksto jam delonge estis ĉe la presisto; sed la aperdato koincidis kun la neantaùviditaj elektadoj por la parlamento, kaj ĉar presado de politikaj propandiloj estis pli urĝa/ kaj profitdona ol tiu de nia Bulteno, la modesta Esperanto-gazeto devis atendi... Tial vi ricevis nun duoblan numeron.

---

F-ino Terryn, nia senlaca kasistino, dum la monato aprilo forvojaĝis al la eksterlando kaj pro tio ne povis prizorgi la enkasigon de la abonkotizoj. Pluraj amikoj ricevis belan salutkarton el Fatima; ŝi daùrigis la ekskurson al Marokko kaj ni esperas ke la dolĉa printempa suno de Afriko alportis al F-ino Terryn multe da sano kaj fortiko por ke ŝi havu ankoraù longjare la kuraĝon administri la financojn de lia Ligo.

---

Ne forgesu pagi senprokraste al Flandra Ligo viaj abonkotizoj ! Dissendado de kvitancoj kostas al la Kaso multe da mono. Akurata pago signifas subtenon de la Ligo.

---

La 14-an de majo okazos en Bruselo specialan kunsidon, kie kelkaj delegitoj de Belga kaj Flandra ligoj ekzamenos la eblecon por pli intima kunlaboro; ili raportos pri la rezultatoj dum kongresa kunveno.